Aneta: Estas la baza lernejo de la unua ĝis la kvara klaso, sed venas infanoj en plej diversaj aĝoj, ĉar ofte ili estas analfabetoj. Ekzemple venis knabino, kiu havis 16 jarojn kaj ŝi eĉ ne sciis kiom da tagoj

havas unu semajno. Sekve, ŝi devis iri en la elementan lernejon.

La infanoj sekvas la bazan lernejon kaj poste ili povas iri al pli alta lernejo en Alto Paraiso, ĝj situas ĉirkaŭ 30 minutojn for de Bona Espero (per aŭto).

SRK: Do, ĉu estas du lokoj?

Aneta: Jes, Bona Espero ankaŭ havas domon en la urbo Alto Paraiso. Fakte, se ili ne havas rimedojn por ie loĝi, ili ja povas loĝi en tiu domo kaj iri tie al lernejo. Semajn-fine ili povas veni al Bona Espero, kiu troviĝas meze en la naturo.

SRK: Ĉu en Alto Paraiso oni ankaŭ instruas Esperanton?

Aneta: Kutime oni ĝin instruas en la bieno de Bona Espero. La infanoj, kiuj loĝas en Alto Paraiso estas jam gejunuloj kaj principe jam scipovas paroli Esperanton.

SRK: Dum kiom da jaroj la infanoj restas kaj post kiom da tempo ili eklernas Esperanton tie?

Aneta: Kiam ili ekloĝas en la institucio ili fakte tuj komencas lerni, ĉar venas volontuloj, kiuj ja ne konas la portugalan lingvon. Ili parolas simple Esperanton, tial la infanetoj en la natura

maniero lernas ĝin per konversacio aŭ eventuale en kursoj, kiujn povas fari la volontuloj. Mi ankaŭ deziras aldoni, ke en la institucio Ursula, Giuseppe kaj

Ada, ankaŭ tre flue parolas Esperanton kaj povas instrui la lingvon. Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia kunestras la institucion kaj Ada estas instruistino en Bona Espero. Ŝi instruas en kvar klasoj samtempe kaj krome helpas multege.

SRK: Ĉu vi bonvolas ankaŭ paroli pri viaj propraj travivaĵoj kaj spertoj tie?

Aneta: Mi havis sufiĉe plenajn tagojn – ĉiu tago estis alia – mi tre multe laboris! Mi leviĝis je la 7-a horo kaj je la 7-a 30 preparis la matenmanĝon. Mi bezonis ankaŭ helpi la infanojn leviĝi, purigi la ĉambrojn, brosi la dentojn, instrui la higienon, ĉar ofte ili ne kutimis al tiaj devoj. Kelkfoje, ili eĉ ne sciis, kio estas piĝamo. Post la matenmanĝo, iu grupo devas helpi lavi la telerojn, ankaŭ tion mi devis kontroli kaj instigi la infanojn, ke ili faru sian laboron korekte. Tio apartenas al la edukada principo de Bona Espero: oni edukas la infanojn por ke ili estu dignaj homoj. Ili fakte estas observataj dum 24 horoj, do neniam estas solaj. Je la 9-a matene ili vestas la uniformojn kaj poste iras al la lernejo, kiu estas apud la domo de la dormoĉambroj, en la sama bieno. Poste mi helpas fari la tagmanĝon. Mi lernis multe pri diversaj fruktoj kaj legomoj, kiujn mi neniam vidis antaŭe. Ekzemple, mi lernis kiel pretigi pladojn kun 'manioko'. En Bona Espero oni plantas preskaŭ ĉion, kion



Havu la kuraĝon helpi!





oni manĝas. Oni plantas maniokon, terpomojn, diversajn legomojn, fruktojn kaj eĉ kafon. Jen mi rakontos al vi pri la vojo de la kafo: Necesas rikolti kaj sekigi ĝin, poste apartigi la kafo-kernojn de la ŝeloj per speciala draŝilo. Sekvas la rostado de la kafo kaj necesas atenti la precizan punkton, en kiu la kafokernoj nek forbruliĝas kaj nek estas verdeskaj. Poste oni muelas la kafon kaj oni povas uzi ĝin. Bongustega!

SRK: Kiu faras tiun laboron? Ĉu la infanoj?

Aneta: Ne ne, kutime faras tion la plenkreskuloj. Tamen la infanoj iom post iom lernas tiajn kaj aliajn procezojn (planti, kuiru, ripari), kaj nur kiam ili atingas sufiĉan aĝon ili komencas ankaŭ tion fari. Unue ili devas lerni esti respondecaj. Je la 12a revenas la infanoj, ili devas lerni viciĝi por ricevi la manĝon. La infanoj tie vere ne sentas malsaton, ili povas manĝi kiom ili volas; ili povas plenigi la teleron 2 aŭ 3-foje. Estas bona manĝo, natura manĝo, ankaŭ la akvo tie estas tute natura, ĝi venas rekte al la montaro. Ĝi apartenas al la plej puraj akvoj de la tuta mondo. Je la unua horo posttagmeze la lernado rekomenciĝas kaj tiam mi kutime instruis Esperanton dum unu horo. Poste mi havis unu horon da paŭzo kaj je la tria horo estis la lunĉo, la infanoj ricevis dolĉaĵon aŭ kukon. Poste ili denove iris al la lernejo kaj ni ekpreparis la vespermanĝon, kiu estis manĝata je la sepa aŭ sepa kaj duono. Post la manĝo ĉiuj infanoj devis bani sin kaj ĝis la naŭa vespere fari siajn hejmajn taskojn. Nepre ĉiuj devis fari tion. Je la naŭa ili iris dormi, ankaŭ mi tiam povis ripozi.

SRK: Kiu pagas la dungitan instruistinojn?

Aneta: Ŝi estas pagata de la ŝtato. Tamen Bona Espero ne estas ŝtata institucio. Ĝi estas finance apogata de germana asocio 'Förderverein Bona Espero e.V.', direktata de Otto Nelken, aktiva Esperantisto.

SRK: Kiu zorgos pri la vestaĵoj de la infanoj?

Aneta: Ofte la vestaĵoj estas donacitaj. Homoj ŝendis donacojn al Bona Espero. Pri lavado zorgis la plenkreskuloj; feliĉe estis lavmaŝino tie. Ĉiu-matene la infanoj devis meti siajn malpurajn vestaĵojn apud la lavmaŝinon. Kiam ĉio estis lavita kaj sekigita, la infanoj reprenis siajn vestaĵojn de la pendigaj ŝnuroj. Plej ofte ili havis nur 2 aŭ 3 kalsonetojn, bluzon, puloveron, pantaloneton, pantalonon, ŝtrumpetojn aŭ eĉ ne, du parojn de ŝuoj kaj tio estas ĉio.

SRK: Kia estas la klimato tie?

Aneta: En la regiono Goiás (centro de Brazilo!) estas tropika klimato kun du jarsezonoj. Unu nomiĝas vintro la alia somero. Dum

la somero estas du ekstremoj: aŭ estas ege varme aŭ ege pluvas. Povas okazi, ke dum unu horo vi ŝvitegas pro varmece kaj en sekva minuto venas nubegoj kaj akvo verŝiĝas kiel el siteloj. Se vi restas ekstere, vi tuj estas plene malseka! Krome estas multaj ŝtormoj. Sed fakte, daŭre estas varme kaj la aero estas humida. Kiam ĉi-tie en Eŭropo estas somero, en Brazilo estas vintro: nokte estas tiel malvarme, ke eĉ necesas uzi litkovrilojn; dum tage estas varmete kaj forte ventas. Sed hejtado ne necesas.

SRK: Kie fakte troviĝas Bona Espero.

Aneta: Ĝi situas tre proksime de granda nacia parko, kiu nomiĝas "Chapada dos Veadeiros". La nacia parko estas tre konata en Brazilo, ĉar ĝi havas tre belajn naturajn fenomenojn. Venas multaj turistoj kaj kelkfoje eĉ vizitas Bonan Esperon. La institucio troviĝas, kiel jam menciite, per aŭte 30 minutojn for de Alto Paraíso (250 km norde de la ĉefurbo Brasilia), fakte en la mezo de nenio, en stepa regiono. Eĉ mi konstatis, ke ĉiu-nokte venis lupoj, mi vidis spurojn sur la ekstera planko antaŭ mia ĉambro. Tial ni aĉetis hundojn, ek de tiu momento jam ne venis la kara lupoj. Viro zorganta pri agrikulturo montris al ni mortigitajn serpentojn, por ke ni povu rekoni ilin. En la hospitalo de Alto Paraíso ekzistas mendikamentoj kontraŭ serpentaj venenoj en nia korpo, sed ja necesas scii kian koloron havis la serpento por povi doni la ĝustan kontraŭmedikamenton! Ankaŭ estas tie multege da formikoj. Ili iris al mia ĉambro amase. Moskitoj ankaŭ abundas. Kutime kiam venas turistoj, ili havas tute ruĝajn gambojn pro la piko. Sed la loĝantoj ja ne suferas pro tio. Ankaŭ tiel okazis al mi: post du aŭ tri monataj mi ne plu estis tiel pikata kiel komence.

SRK: Kiaj fruktoj kreskas tie?

Aneta: Estas multe da mango-fruktoj, papajoj, bananoj, ananasoj kaj multe da citronoj. La tipa manĝo en Brazilo estas rizo kaj fazeolo.

Aneta: Rilate la lingvan flankon, necesas diri, ke Esperanto ne estas la celo de Bona Espero, ĝi ne volas produkti esperantistojn. Tion multaj homoj erare supozas. Oni volas unue helpi al la infanoj, por ke ili havu iun vivan bazon. Tamen la infanoj sentas la bezonon pri komuna lingvo, ĉar ja venas multaj gastoj, kun kiuj ili deziras paroli kaj interkompreniĝi. Tio malfermas al ili pli vastan horizonton, iu sence ili sentas esti mondaj civitanoj. La infanoj de Bona Espero sentas la neceson de Esperanto. Flanke menciite, en tuta vasta Brazilo oni ja parolas la portugalan lingvon. Tio signifas, ke la plej multo de la brazilanoj ne sentas la neceson de internacia lingvo. Estas mirinda afero, ke en la mezo de nenio estas tia institucio kun tiom valora laboro; tio ŝajnas al mi miraklo.

SRK: Kia estas la estonteco de Bona Espero.



Aneta: Gesinjoroj Gratapaglia daŭre estas plenaj je forto kaj tre efike laboras. Ni vidos, kion alportos al ni la futuro.

SRK: Kio okazas kun la infanoj post la restado en Bona Espero? Ĉu oni scias tion?

Aneta: Kutime tiuj infanoj iĝas memfidaj, ili scias kion celi en la vivo. Konsiderinda nombro el ili akiras universitatan diplomon, iĝas instruistoj, oficistoj, kaj tiel maniere atingas la supran parton de la socio. Do sen Bona Espero ili tutcerte ne havus tian pozicion kaj loĝus sur la strato aŭ havus mizeran vivon.

SRK: Sed finfine Bona Espero solvas nur etajn problemojn de la tuta brazila socio, kion vi opinias pri tio?

Aneta: Jes, certe Bona Espero estas nur guto en la maro. Sed ja iu devas komenci gutil! Ĉiu estas invitata fari alian guton.

SRK: Sed tio ne solvas la bazan problemon, kiu fontas en la socio. Ekzemple la problemo de la demografio.

Aneta: Tion en Bona Espero oni 'kuracas' en la radiko mem de la problemo: La knabinoj estas edukataj kompreni la gravajn

sociajn problemojn de la propra lando. La virina sento de sintlaso ne disvolviĝas en Bona Espero. Certe vi konsentas, ke oni plej efike povas ŝanĝi ion en la personoj, kiam ili estas infanoj.

SRK: Tamen el la 20 infanoj de tiu familio Bona Espero savis ja nur unu. Do ankaŭ nur unu guto.

Aneta: Do mi kore invitas vin iri al Brazilo kaj starigi novajn projektojn.

SRK: Kion alportis al vi persone tiu restado en Bona Espero? Al via pensmaniero?

Aneta: Certe mi persone tre kreskis, mi lernis akcepti multajn aferojn kaj ekoni miajn proprajn limojn. Tial mi nun povas pli bone decidi kion mi povas fari kaj tion kion mi ne volas fari.

SRK: Kian mesaĝon vi dirus al la okcidentanoj?

Aneta: Havu la kuraĝon helpi.

SRK: Mi kore dankas al vi.

Intervjuis por SRK:
A.Grossmann



La Esperanto-centro: EVENTOJ

Eventoj estis fama, 2-semajna Esperanto-gazeto, aperinta inter 1992 kaj 2002.

La gazeto en papera formo ne plu aperas (almenaŭ "paŭzas"), sed la *Esperanto-Centro "Eventoj"* en Budapeŝto daŭre funkciigas diversajn servojn. - La eldonejo *LINGVO-Studio / Eventoj* daŭre staras je via dispono.

EVENTOJ - plena arkivo

Eventoj ne plu aperas de post decembro 2002! Anstataŭ la papera gazeto ni rekomendas al vi utiligi la novan servon "ret-info" (vidu sube). Por utiligi la grandan datenbankon kaj informaron de la artikoloj, ni disponigas al vi senpage la plenan kolekton de ĉiuj numeroj de Eventoj.

o RET-INFO

Retpoŝta Esperanto-novaĵagentejo!

Ni kolektas kaj FILTRADAS la mesaĝojn por vi kaj anstataŭ VI! La retpoŝta Esperanto-novaĵservo "Ret-Info" aŭtomate sendos al via retadreso la plej interesajn novaĵojn de la internacia Esperanto-movado.

o "Plena Kalendaro"

La "*Plena Kalendaro de Esperantaj Aranĝoj*" listigas ĉiujn konatajn Esperanto-aranĝojn, renkontiĝojn. La internacia kalendaro estas daŭre (minimуме monate) aktualigata. Se mankas iu aranĝo, ni dankas vian kompletigon.

o Faka literaturo en Esperanto, S.T.E.B

En la *Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko*, S.T.E.B ni klopodas ne nur kolekti la fakan literaturon en la reto, sed ni organizas la redispigon (re-komputiligon) de antaŭe aperintaj fakaj verkoj. Bonvenas via kunlaboro.

o Virtuala ekspozicio pri Esperantaj bildkartoj

La ĵus malfermita ekspozicio prezentas pli ol 560 fabrike produktitajn Esperantajn poŝtkartojn. Ni estos dankaj, se vi helpos kompletigi la unikan kolektaĵon.

o Aliaj niaj servoj

- Ligoj al kelkaj interesaj Esperantaj retpaĝoj
- Turismaj informoj pri Hungario
- Esperantlingvaj dissendolistoj, retlistoj

«Se plenŝtopiĝas via leterkesto per neinteresaj mesaĝoj - ne kulpigu aliajn!
Aliĝu al la retpoŝta novaĵservo RET-INFO!

Per iu ajn demando kontaktu nin:

Eldonejo LINGVO-Studio / Eventoj en la Budapeŝta Esperanto-Domo
Leiningen u. 4, Budapest, HU-1193 Hungario.
Poŝta adreso: pk. 87, HU-1675 Budapest, Hungario.
Telefono/fakso: +36 - 1 - 2828885

... el la frandindaj receptoj de avinjo Odette ! ...

semolaj kneloj


Vi bezonas : litron da lakto
250 ĝis 300 gramojn da semolo
50 gramojn da butero
2 ovojn
cinamon miksitajn kun sukero...

En varman lakton ŝutu malrapide la semolon, kirlu la tutajn por obteni glatan miksaĵon, aldonu la sukeron... Kiam la preparaĵo estas malvarmeta, aldonu la buteron kaj la ovojn, miksu kaj verŝu en pladon... Ebenigu !

Lasu malvarmiĝi... (Vi povas prepari matene cele kuiron vespere en pato).

Nun, via « semol-preparaĵo » estas malvarma. Tranĉu ĝin je formo de kvadratoj aŭ bastonetoj.

Enmetu en paton buteron aŭ margarinton, eĉ oleon laŭ via deziro aŭ kutimo. En tiun paton disponigu la distranĉitajn pecetojn kaj baku ilin ambaŭflanke por ke ili bele koloriĝu...



Lokigu la jam salivigajn pecetojn en belan pladon kaj pulvorŝprucigu sukeron kaj cinamon.

Frandu kun piroj eventuale aĉetitaj en skatoloj, aŭ pli bone kun fruktoj el via ĝardeno antaŭe sterilizitaj !

Vi ankaŭ povas aldoni iom da pomkompoto, kiu bone akordiĝas kun tiu preparaĵo.

... ..

En la vilaĝo tiujn knelojn oni ĝu-frandas je vespermanĝo... Ili ankaŭ estas ŝatataj de la « maljunuloj » !!!...

Bonan apetiton !

Ĉu denaskaj esperantofonoj ĝuos pli longan vivon?...

Dulingvismo: rimedo kontraŭ maljuniĝo...



Uzi flue du lingvojn ek de la infan-aĝo ebligus bremsi la ekmalfortiĝon de iaj memor-funkcioj ligataj al la forflugo de la jaroj, laŭ studaĵo efektivigita en Kanado. Ellen Bialystok, el la universitato de York, proponis al 150 volontuloj, dulingvaj aŭ ne, junaj aŭ maljunaj, specifan ekzercon por testi ilian ag-rapidecon kaj koncentriĝon.

La personoj dulingvaj reagis pli rapide ol tiuj, kiuj parolas nur unu lingvon, kaj tiu rezulto validas en la du kategorioj de aĝo (de 30 ĝis 59, kaj de 60 ĝis 88), raportas la serĉantoj en la revuo *Psychology and Aging*. La dulingvuloj, kiuj ĉiutage uzas du lingvojn ek de la 10a jaraĝo, profitas ankaŭ pli bonan koncentriĝo-kapablon. Tiuj rezultoj montriĝas specife impresaj je la pli aĝaj personoj, reliefigas Ellen Bialystok, ĉar la fakto sin lasi „malatentigi“ de duonrangaj informoj, ĝenerale ampleksiĝas paralele al la maljuniĝo. La uzado de du lingvoj malgravigus la efikoj de la maljuniĝo sur la memor-kapabloj.

D'ou vient le mot "spam" ?



A l'origine, SPAM est une marque de corned-beef, et plus précisément un acronyme pour Spiced Pork And Meat (pâté épicé à base de porc et de viandes). Un aliment peu ragoûtant mais qui a beaucoup aidé l'armée américaine pendant la seconde guerre mondiale.

L'utilisation de ce mot pour désigner les courriels abusifs est due aux *Monty Python*. Dans un de leurs sketches, issu d'un épisode du *Monty Python's Flying Circus*, les comiques britanniques, déguisés en Vikings amateurs de Spam, prononcent ce terme sans relâche dans une chanson.

Pourquoi le terme « spam » en informatique ?... Parce qu'à l'exemple du corned-beef précité, le spam n'est pas du tout apprécié des... spammés !

... Plugenda -kaj pluginda !- propono ...

"Saluton,

Jen interesa ideo, kiun mi malkovris ĉe niaj katalunaj samideanoj. Temas pri konigi Esperanton, uzante ĝin por esperantigi novaĵojn ĉe la informejo **Indymedia**.

Indymedia estas sendependa fonto de informo; ĝi jam ekzistas en Esperanto en Brazilio : <http://www.midiaindependente.org/eo/blue/>, kaj baldaŭ esperantistoj el Barcelono proponos Esperanton kiel lingvon elekteblan por la kataluna **Indymedia**, post la kataluna, la hispana kaj la angla (<http://barcelona.indymedia.org/>) kaj eĉ en Andorro nia loka samideano provos tion fari (<http://andorra.indymedia.org/>)

En Francio, ekzistas jam tri ttt-ejoj de **Indymedia**: Parizo (<http://paris.indymedia.org/sommaire.php3>), Tuluzo (<http://indymedia.crac-g8.eu.org/>), "Nice" (<http://www.nice.indymedia.org/>) kaj "Marseille" (<http://marseille.indymedia.org/>)

Neniu el tiuj francaj ttt-ejoj proponas alian lingvon ol la francan.

La ideo estas do, proponi al tiuj ttt-ejoj **tradukon** de eroj de iliaj paĝoj al **Esperanto**. Ne temas pri traduki la tutajn artikolojn, krom se ni estas sufiĉnombraj post kelkaj monatoj. Temas pri traduki la titolojn kaj la "ĉapeloj" de la artikoloj. Plie, ni povos tute libere proponi ni mem niajn informojn pri niaj agadoj: tio estos bona ilo por reklamadi.

Komenci la laboro postulas almenaŭ tri volontulojn, por traduki, relegi kaj korekti; la laboro devos esti serioza, eĉ se ĝi ne estos ega (maksimume du au tri informojn semajne, ofte unu au neniu)

Por Tuluzo, mi varbas volontulojn, ili sin turnu al mi. Mi esperas, ke en la aliaj francaj urboj troviĝos volontuloj por tion fari. Informu tamen pri viaj agadoj kaj viaj rezultoj.

La ideo povos iĝi tutmonda, ĉar ekzistas ttt-ejon de **Indymedia** en ĉiu kontinento. Ĝi estas sendependa, interancia, do... ĝi bezonas nin ! (eĉ se ĝi ne konscias tion !)

Kore... "

Christian Pinard kristian.pinard@wanadoo.fr**Helpopeto... plenuminda!**

BUGA-2005 (Federacia-ĝardeno-ekspozicio)
en **Munkeno**, de majo ĝis septembro 2005

Saluton !



BUGA okazos sur iama industria tereno (iama flughaveno *Riem*) en la orienta parto de Munkeno, kun slogano: "*Ŝanĝo de Perspektivoj*"

Organizantoj de tiu aranĝo de si mem demandis al la **Esperanto-Klubon Munkeno** pri kontribuo por unu tuta tago. Dum la lasta kuna diskutado la planoj estis iomete precezigitaj. En aŭgusto 2005 (eble post la 10. 08.) **ni havos la eblecon prezenti Esperanton** en la serio *Kulturo sen limo*.

Ni povos prezenti inter 9:00 kaj 16:00 sur malferma podesto diversajn: rakontojn, fabelojn, skeĉojn, kantojn, teatraĵojn ktp. La prezentaĵoj ne devus esti tro longaj, ne plu ol 20 minutoj, ĉar la spektantoj nur pasante rigardos kaj aŭskultos. Ili eble sidigos nur por iomete ripozi, kaj nevole estos renkontontaj Esperanton... Ni povos eble dufoje prezenti kelkajn aferojn dum la tago.

Ni, en Munkeno, pensas, ke esperantistoj devas kapti tiun ŝancon prezenti Esperanton publike. La organizantoj plenumas la varbadon kaj la tutan programon de tiu serio. Ni nur devos oferti la artistojn kun iliaj programkontribuoj.

Bedaŭrinde la munkena klubo ne estas tiel forta por solvi tiun taskon sole, ni bezonos helpon de ĉiu kapablulo (ne nur el Germanio), kiu povas kaj volas ion kontribui aŭ konas iun personon aŭ grupeton.

Finance la kontribuantoj nur ricevos malgrandan sumon por la urba veturado kaj la manĝado. Sed tiun problemon ni eble solvos kun GEA.

Ĝis aŭgusto ni devos prezenti ĝeneralan planon kaj ni devas konvinki la organizantojn de la sufiĉe bona kvalito de la programpartoj. Ili ne volas ion riski.


Mi petas vin, transdonu tiun ĉi leteron al viaj konatoj. Eble ili estos pretaj por iu kontribuaĵo.

Bonvolu respondi al buga2005@munkeno.de

Kun salutoj

Karl Breuminger, Estrarano de la Esperanto-Klubo Munkeno e. a.

karlik@karlist.net



Est-ce que l'anglais a gagné ?

La réponse du diplomate irlandais M. Seán Ó Riain aux personnes croyant sincèrement que l'anglais a gagné, que *'le train est passé'* comme disent beaucoup qui ne sont pas forcément contre l'espéranto mais qui sont sûrs qu'il est déjà trop tard... Comme Irlandais je pense que même chez nous, où nous sommes en avance sur le reste de l'Europe puisque l'irlandais s'est perdu depuis quatre générations et que tout le monde parle anglais, un grand mouvement poursuit la lutte pour sauver notre langue et n'accepte pas l'idée que l'anglais ait gagné.

1) Nos langues nationales sont comme nos animaux sauvages, et l'anglais, maintenant la plus forte d'entre toutes, est comme le lion. Accepter que l'anglais domine *"parce que c'est comme ça"* reviendrait à laisser divaguer les animaux d'un zoo juste parce qu'ils ont cassé leur cage. Ce serait la disparition de nos langues nationales. Il serait hypocrite de faire comme si nous n'avions pas compris tout cela et il est bien dommage que les autres animaux (langues) n'aient pas été assez forts pour concurrencer le lion (l'anglais) au marché libre. La mort des animaux (langues) donne raison à la supériorité du lion (l'anglais). Quand il y a, comme maintenant, une très grande différence de force entre les langues, la loi est libératrice et la liberté débridée est opprimante.

2) L'anglais comme langue internationale ressemble à la première automobile construite en série, le modèle *T* de Ford -un immense progrès à l'époque-... mais qui, maintenant, voudrait échanger sa nouvelle BMW contre un modèle *T* Ford ? L'espéranto comme langue internationale (je dis bien internationale, car il est vrai qu'elle ne doit pas servir à un autre usage) est comme le dernier model de BMW, (d'avion, ou de bicyclette. . . selon vos goûts).

3) L'anglais ressemble à une rose rouge, belle fleur bien aimée. Mais qui apprécierait un jardin plein de roses rouges, et sans aucune autre fleur ? L'usage de l'anglais sans limite dans le monde va nous mener vers un tel jardin pauvre en couleurs linguistiques.

4) Le français aussi a été "victorieux" il y a un siècle et le latin 2000 ans plutôt, mais que sont-ils devenus ? Malgré la "victoire" de l'anglais, pour faire du commerce en Chine, il faut apprendre le chinois !...

5) Est-ce que tous les parlementaires européens connaissent l'anglais ? Si oui, à quoi servent les interprètes ? Et sinon, où l'anglais a-t-il "vaincu" ?

6) En Mongolie un anglophone est peut-être capable de trouver son hôtel, mais un espérantiste peut discuter en espéranto de la culture mongole avec des Mongols !...

7) Si quelqu'un essaye de se vanter de ses savoirs en anglais demandez-lui de vous expliquer comment: *a - Faire fonctionner un véhicule. b- Faire une omelette aux pommes de terre.* Un espérantiste moyen, après quelques mois d'apprentissage de la langue, est capable de vous répondre.

Seán Ó Riain

Président de l'Union Européenne d'Espéranto

⇒⇒⇒ Visitez <http://www.esperanto.net>, <http://www.lingvo.org> et <http://www.lernu>

== ☆☆☆ ==

... décervelage à l'américaine...

La artikolo *"Décervelage à l'américaine"* de profesoro *Herbert I. Schiller*, publikigita en *Le Monde Diplomatique / Manière de voir*

<http://www.monde-diplomatique.fr/1999/08/SCHILLER/12381> > estas nun legebla en Esperanto-traduko dank'al *Vilhelmo Lutermano* ê

<<http://eo.monediplo.com/article906.html>>

sub la titolo *"Usoneca sencerbigo"*. Tiu ĉi artikolo meritas vastan diskonigon por ebligi al la mondo eskapi al idiotigo kaj prepari sin al civilizado de la lando, kiu pretendas havi la

dian mision civilizi la mondon.





La nuna kopio de mesaĝo al la kebeka gazeto *Le Devoir* estas (iom malfrua) reago al letero de leganto, kiu aperas poste. Li skribis ke "*la angla fariĝas rapide iaspeca Esperanto*", aldonis, ke la angla sukcesis tie, kie malsukcesis Esperanto, kiu ne havis grandan praktikan sukceson. . . .

"Bonjour,

Il peut être démontré que la quasi totalité des personnes -- intellectuels, journalistes, enseignants, hommes politiques, décideurs -- qui utilisent le mot "espéranto" dans un contexte semblable à "*L'anglais devient vite une sorte d'espéranto*", n'en connaissent à peine plus que le nom (voir "*L'anglo-américain, devenu l'espéranto de notre siècle. . .*" en section documents de <www.esperanto-sat.info>).

Si l'espéranto n'a pas connu "*trop de succès pratique*", selon M. Gilles Bousquet, il conviendrait de dire, au contraire, au vu de la présentation qui en a trop souvent été faite, que c'est extraordinaire qu'une telle langue ait survécu, connaisse un tel champ d'applications et un tel essor, alors tout a été mis en oeuvre pour que le public croit aveuglément qu'il n'est point de salut en dehors de l'anglais, que l'espéranto n'est qu'une utopie, que c'est inutile, que ça ne sert à rien, que ça n'a pas marché, etc. . Qu'est-ce qu'on a pu lui casser sur les reins ! Si les régimes totalitaires ont une lourde part de responsabilité dans cette situation, il faut ajouter que la bêtise épaisse et l'absence d'esprit critique ont largement contribué aussi à cet état de fait.

Sur le plan linguistique, la précision d'une langue n'est pas liée à sa complexité grammaticale. En quoi la complexité de la conjugaison et les verbes irréguliers (près de 300 en anglais), la prononciation variable d'une lettre, l'accent d'intensité indéfinissable, impossible à déterminer de façon logique, l'identification confuse de la fonction grammaticale, les homonymes et les tournures idiomatiques innombrables, les polysémies (21 120 significations pour les 850 mots du vocabulaire de base de l'anglais !) ou le genre pour les objets (en français), et autres règles incohérentes et impossibles à expliquer simplement et clairement, apportent-ils plus de précision ? La connaissance requise pour comprendre un texte ordinaire à 99%, c'est-à-dire nécessitant la consultation d'un dictionnaire pour un mot inconnu sur cent, est de **7000 mots en anglais** contre **2000 en espéranto** (y compris ses affixes). Des recherches ont démontré que l'anglais, de par ses aspects linguistiques, offre **le terrain le plus propice qui soit à la dyslexie**. Et c'est une telle langue qui est imposée d'emblée aux enfants, de plus en plus jeunes, comme première langue étrangère ! Comme "*langue mondiale pour faciliter les échanges de tous ordres*", il existe beaucoup plus adéquat que l'anglais, mais le poids des préjugés et de l'ignorance est tel que presque tout le monde croit encore qu'il faut se maintenir dans les ornières de la routine. En raisonnant selon le même principe, il aurait fallu renoncer au traitement informatique des données, ou au téléphone du fait qu'au départ il n'avait que trop peu d'utilisateurs. Certains entravent la progression de l'espéranto comme d'autres ont retardé l'usage des chiffres arabes ou refusent encore le système métrique.

L'espéranto est une langue très riche, nuancée, et il n'y a pas lieu de le comparer avec cet anglais souvent qualifié à tort de "*langue de Shakespeare*", appauvri, limité, abâtardi et massacré, ce "*Broken English*" ou "*Bad English*" dans lequel tous les verbes restent à l'infinitif, à la façon de "*moi parler anglais mais moi pas comprendre toi si toi parler trop vite*". Pitié pour Shakespeare !

L'espéranto a été conçu pour la communication **entre peuples de langues différentes**, pour être **aisé à apprendre par n'importe lequel d'entre eux**, indépendamment de sa langue maternelle, pour permettre **un maximum de fidélité** dans la transmission des valeurs culturelles sans les entacher. **Ce n'est pas le cas de l'anglais** dont l'expansion est essentiellement liée à un passé colonialiste, puis impérialiste, à une volonté expansionniste et dominatrice, et non à une supériorité linguistique. "*Il faut être un vaurien pour réussir dans l'armée*", avait dit le maréchal Montgomery qui, soit dit en passant, a fort bien réussi ! C'est au libre choix de gens mieux éduqués et plus cultivés que la moyenne que l'espéranto doit ses conquêtes, sans recours aux armes et à des corps expéditionnaires, sans pillage ni oppression, sans semer la terreur, la dévastation et la mort. Le Québec n'est-il pas l'une des portions de notre planète où l'on devrait justement être capable d'y réfléchir avec plus de profondeur ? En apparence, pour les natifs anglophones, la langue de leur pays, donc leur langue nationale, est le meilleur choix imaginable de langue internationale. Chose curieuse: personne ne relève le fait qu'aucune langue nationale, apparemment idéale pour une entité, ne l'est pour l'ensemble des autres, à plus forte raison quand ces "autres" représentent 92% de l'humanité ! Il n'est cependant pas pour autant la langue idéale pour eux, puisque **l'encyclopédie Encarta en recense 38 variantes**. De plus, ceux d'entre eux qui maîtrisent l'espéranto lui préfèrent celui-ci dans les relations internationales : voir sur <<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/>> un exemple éminent en la personne du professeur John C. Wells, l'un des plus brillants spécialistes au monde de la phonétique de l'anglais.

Sur les plans de l'équité, de l'efficacité, des délais et des coûts d'acquisition, **l'espéranto est imbattable, et même incontournable**. Certains opposent le "succès" de l'anglais à "l'échec" de l'espéranto. Mais parler de "succès" quand il n'y a qu'une minorité dérisoire de ceux qui ont appris l'anglais à grands frais et avec beaucoup de peine qui peuvent débattre d'égal à égal avec un natif anglophone montre un certain degré de naïveté, d'inconscience, d'ignorance, voire de conditionnement : puisque tout le monde le dit, tout mouton de Panurge qui se respecte se doit de suivre cette voie !

Cette situation d'inégalité des chances, d'iniquité, s'observe dans les négociations et les débats importants qui engagent le sort de centaines de millions d'hommes ou même de l'humanité tout entière : institutions européennes, sommets de Rio ou de Kyoto, etc. . **Les intervenants natifs anglophones tiennent le haut de la tribune** et il n'y a à peu près qu'un intervenant sur quatre non natif qui ose s'exprimer en anglais, même si son niveau de compétence du sujet traité est plus élevé que la moyenne ! La maîtrise de l'anglais a ainsi plus de poids que la compétence dans telle ou telle spécialité. Même le président Chirac, qui a séjourné aux États-Unis pour se perfectionner, a affirmé publiquement qu'il n'utilise jamais l'anglais pour des négociations importantes. Alors, que dire de centaines de millions de gens qui n'ont pas eu et n'auront jamais la possibilité de séjours linguistiques de longue durée en pays anglophones ? Et ceci sans parler du handicap financier de tous les pays qui dépensent des sommes astronomiques pour gaver leurs citoyens, et surtout leurs enfants, à l'anglais au détriment de bon nombre d'urgences budgétaires ! Et ceci, mieux encore, au profit des pays dominants de l'anglophonie, ce qui avait amené un directeur du British Council à déclarer que "*le véritable or noir de la Grande-Bretagne n'est pas le pétrole mais la langue anglaise*" !

Dans l'Union Européenne, l'anglais permet à la Grande-Bretagne d'imposer ses choix avec une grande facilité puisque, par exemple, le traitement, l'examen, la compréhension des dossiers et les décisions qui en découlent sont retardés par la nécessité de traduire. Où que ce soit, au niveau mondial aussi, la contrainte de s'exprimer en anglais permet aux pays anglophones dominants d'avoir toujours plusieurs longueurs d'avance. Pendant que les autres attendent les traductions, ils disposent toujours d'un délai supplémentaire pour étudier leur stratégie, pour fomenter leurs coups bas. Il n'est pas rare que des représentants de pays non anglophones soient ainsi amenés à signer des contrats ou des traités insuffisamment étudiés, ou qu'ils ont plus ou moins bien compris du fait des contraintes de temps.

Et certains osent parler de "réussite" !

La réussite incontestable est du côté de ceux qui veulent, par l'anglais, imposer un ordre dans lequel tout va et ira toujours très bien pour eux mais dans lequel tout va et ira de travers pour l'humanité.

L'espéranto a donc plus que jamais sa raison d'être.

A quand un dossier sur ces questions dans *LE DEVOIR* ? Leur examen, avec plus de profondeur, avec moins de superficialité, n'est-elle pas un « DEVOIR » prioritaire ?

Bien cordialement ”

Henri Masson

Coauteur, avec René Centassi, ancien rédacteur en chef de l'AFP, de *"L'homme qui a défié Babel"*, paru simultanément en seconde édition avec la traduction en espéranto chez L'Harmattan, Paris, 2001. Traduction en cours en espagnol. <espero.hm@club-internet.fr Tel & Fax : + 33 02 51 31 48 50 <http://www.esperanto-sat.info>

Montréal, Québec, Canada .

LE DEVOIR

Lettres : *L'anglais devient vite une sorte d'espéranto*

Gilles Bousquet Édition du mardi 15 juin 2004

« Pour réduire les problèmes causés par les nombreuses langues parlées sur terre,

M. Zamenhof a créé une langue qu'il voulait universelle vers 1887 sans trop de succès pratique.

La preuve en est qu'il y a encore plusieurs langues de grande diffusion utilisées comme langue de travail à l'ONU : l'anglais, le français, l'espagnol, le russe, le chinois, l'arabe, le portugais, l'allemand, les langues turques, l'hindi-ourdou, les langues austronésiennes et le japonais. Il faut y ajouter plusieurs autres langues et dialectes, ce qui représente une belle tour de Babel terrestre.

À cause des nombreuses conquêtes anglaises et des succès de nos voisins états-uniens, une seule langue se distingue maintenant des autres par son utilisation mondiale dans les communications, la finance et le commerce. On le sait, c'est l'anglais qui a réussi où l'espéranto a échoué : une langue mondiale pour faciliter les échanges de tous ordres.

Les autres langues vont demeurer encore longtemps, au moins, pour les affaires culturelles, mais il sera de plus en plus difficile de fonctionner sans la langue anglaise qui a pris la première place mondiale et qui n'est pas près de la lâcher. Cette constatation nous force à conclure qu'on doit, tout en améliorant notre français qui en a bien besoin, apprendre l'anglais très tôt dans la vie.

On ne peut pas, malheureusement, ne pas tenir compte d'un tel courant plus longtemps. Ne pas tenir compte d'un fait ne le fait pas disparaître pour autant ».



... cu sekvinda ekzemplo por « nia » ministro ? ...



La ministrejo de edukado de la franca komunumo de Belgio disdonis unu kompaktdiskon (KD) en ĉiu klaso de ĉiuj lernejoj de unua kaj dua grado sub la titolo "Éveil aux langues" (eksento al fremdaj lingvoj). Ĝi enhavas kanzonojn en 16 diversaj lingvoj, **inter kiuj Esperanto.**

Le ministère de l'éducation de la communauté francophone de Belgique a distribué un CD dans chaque classe de toutes les écoles de premier et second degré sous le titre sous le titre "Éveil aux langues". Il contient des chansons en 16 langues différentes **parmi lesquelles l'espéranto.**

NB... el la redaktejo de « La Informilo : la aludita « sukceso » de la evento naskis debaton inter du TTT-uzantoj, nome Aleks kaj Nikolao... Niaj legantoj malkovros parton de tiu inter-argumentado, kiu verŝajne daŭros. . . post la eldono de nia numero 127 ! . . .



In uea-membroj@yahoo.com, Nikolao Grishin konkordo@s... . . skribis::

Saluton !

Ĉu al IJK venis 355 aŭ 455 aŭ eĉ 3455 homoj, kia diferenco? Se la homoj kunvenis por agrable pasigi tempon, kiel tio koncernas nin, batalantojn por ke la homaro akceptu Esperanton kiel internacian lingvon?

Jes, la homoj uzis Esperanton dum siaj ludoj kaj koncertoj, sed ĉu la lingvo mem kiel rimedo havas grandan signifon? Unuaj esperantistoj ne aranĝadis kongresojn...ili verkadis artikolojn kaj lernolibrojn, tradukadis, kaj eĉ kiam ili komencis aranĝadi kongresojn, ili dum la kongresoj laboris per kapo, sed ne per manoj kaj piedoj. Tial ni ĝis nun studas materialojn de unuaj UKoj, sed **nuntempaj Universalaj Kongresoj, kaj des pli la junularaj, postrestigas nenion**. Do, mi proponas, ke oni iomete plisobriĝu rilate al IJK-2004. Pri ĝi informis neniu serioza rusia gazeto...

Mi trovis nur unu informeton en loka ĵurnalo. Baldaŭ, en nia urbo, okazos tradicia urba festivalo, kiun partoprenos eble 30 000 homoj. Estos multe da konkursoj, koncertoj, fajroverkoj, ktp. Ne malbona afero per si mem, sed ĉu ĝi estas grava por la homaro? Ne, kaj **tion saman eblas diri pri IJK**.

Esperantistoj devas sobre ekrigardi sin mem kaj ŝanĝi sian strategion, de korpaj kunvenoj al cerba kunlaboro...

Nikolao

Karaj,

Mi absolute miras, kian reagon stimulas la sufiĉe fakta, neŭtrala demando "*Kiom da homoj partoprenis (aŭ aliĝis) al IJK?*".

Nekredeble, kiom furiozan kaj akran interŝanĝon ĝi okazigis!! Terure!! Dum IJK oni ne nur amuziĝas, oni **ankaŭ multe laboras**, aparte dum ĉi-jara eldono, legu ĉi-sube...

Reage al reago de Nikolao, mi devas diri:

- Ĉu vi persone ĉeestis tiun sukcesan IJK-n?
- Se ne, KIO permesas al vi aserti, ke ĝi postrestigis nenion?? **Oni ne juĝu, kion oni ne konas!**
- IJK-j laŭ mia scio ne estis ekkreitaj por altiri atenton de amaskomuniloj, sed ĉefe por kunvenigi esperanto-parolantojn en agrabla etoso. . . .
- Tamen de kelkaj jaroj, la *Brusela Komunikadcentro* utiligas la kongresojn UK kaj IJK por fari larĝajn gazetarajn kampanjojn, instigante ĉiujn sendi komunikojn al siaj naciaj kaj lokaj gazetoj.

Ĉu tio ne sufiĉas al vi? Ĉu vi ne vidis tiujn alvokojn de *Daffyd ap Fergus* kaj *Marko Lins*? Ĉu vi mem partoprenis la kampanjojn, anstataŭ kritiki?

- Tamen, jam dum la unua tago, mi vidis ĵurnalistojn filmi kaj intervjui la organizantojn. Aperis pluraj artikoloj pri IJK en la rusia gazetaro (vidu mesaĝon de BKC julie)
- Krome, responde al la kerno de la kritiko, kiun oni ofte aŭdas en rusiaj asocioj "*Aranĝoj, ĉu por ripozigi aŭ por labori/reklami ktp??*", mi dirus, se vi ĉeestus la IJK-n, vi spertus, ke apud la distraj programeroj, buntaj kaj kvalitaj
- Krome, responde al la kerno de la kritiko, kiun oni ofte aŭdas en rusiaj asocioj "*Aranĝoj, ĉu por ripozigi aŭ por labori/reklami ktp??*", mi dirus, se vi ĉeestus la IJK-n, vi spertus, ke apud la distraj programeroj, buntaj kaj kvalitaj (koncertoj, teatro, prelegoj, diskejo, dancado ktp) estis **abunda, ege interesa kaj fruktodona TEMA programo**, kies ĉeftemo estis "*Internacie, June, Kune*" aŭ io simile.

Estis pluraj diskutoj, laborgrupoj, trejnadaj pri "*Eo-ideo: por la socio aŭ por si mem*", "*Kio estas Eo-organizo*" "*Diskuto pri Kontinenta Agado*" "*Estonteco de junulara esperantista movado en Rusio*" "*Portreto de ideala Esperantisto*" *"*Eo-klubo*" kaj aliaj...

- Krome, unufoje laŭ mia kono, estis aranĝita kadre de IJK "*Amas-komunikila Centro, AKC* (trejnado pri reta informado, farado de televid-raportoj, de radio-elsendoj, de IJK-gazeto)
- Aldone, unufoje ankaŭ en mia tempo, kune organizita kun ILEI, okazis seminario "*Flugilo de Malfacila Vento*", kiu trejnigis kaj diplomigis multajn novajn instruistojn
- ... Kiu diris, ke dum IJK oni nur amuziĝas?

Kore, kaj IJK-defendeme,

Aleks, kiu ja ĉeestis IJK-n!

LIBERA MUND

Post iu angla vetoo...



Henri Masson* citis artikolon de *THE GUARDIAN*, kiu klarigis, ke la Franco *Michel Barnier* estis vetoita de *Tony Blair*** kiel prezidento de la *Eŭropa Komisiono*, ĉar li ne sufiĉe regis la anglan lingvon, same *Jacques Chirac**** vetois *Chris Patten*, ĉar li ne bone regis la francan.

Tio certe estas du objektivaj observoj, kiuj unufojon pli, montras, ke regi fremdan lingvon estas tre malfacile eĉ por kulturitaj homoj, kiuj dediĉis grandan parton de sia vivo al studo de fremdaj lingvoj... El tio ni povas konkludi, ke regi fremdan lingvon estas neeble por ordinara civitano, kiu devas studi multajn aliajn temojn kaj ne povas dediĉi sian tutan tempon al lernado de fremdan lingvon.

Tial, kiam per instruado de la angla lingvo en elementaj lernejoj la ministerio pri nacia edukado anoncas, ke "...je la fino de la deviga instruado (16-a jaro) la lernantoj, devos regi DU fremdajn lingvojn...", oni povas nerefuteble aserti, ke tio absolute neblas! Kial daŭre mensogi al la popoloj pri la reala efikeco de la lingvostudo? Kial ne konsenti je komparo inter rezultoj de instruado de iu fremda lingvo kaj la rezultoj de instruado de la esperanta lingvo? Same, kiam *Kinnock*, *Prodi* kaj *S-ino Reding* respondas, ke la *Eŭropa Komisiono* celas "...protekti plurlingvismon kaj defendi la diversecon de kulturoj...", kiam FAKTE, monaton post monato, ili tutsimple instalas anglalingvan monopolon, kiun ili prezentas kiel praktikan kaj malmultekostan solvon (sed ne menciante, ke tio valoras nur por ili!...) tio estas hipokrita mensogo.

Ne utilas memori la pli ol 750 postenojn de E.U. rezervitajn por denaskaj angloparolantoj, la postulon al la orientaj landoj, ke ili prezentu siajn dokumentojn NUR EN LA ANGLA LINGVO, la nerespekton de la statutoj de la *Eŭropa Unio*, kiu demandis, ke la deputitoj ricevu tradukon de ĉiuj dokumentoj en sia nacia lingvo por bone kompreni la temon de la diskutoj, tiel ke ofte la neanglaj deputitoj, aparte en la komisionoj, ne povas partopreni ĉar la debatoj okazas ĉefe en la angla, ktp ktp.

La lasta iniciativo de *Kinnock*, kiu laŭ iu artikolo konas nur la anglan lingvon, estis ordoni al la oficistoj de la telefonservo de la E.U.-Komisiono en Bruselo, ke ili, de la 1-a de majo 2004, respondu NUR EN LA ANGLA LINGVO. Ŝajnas, ke multaj protestoj iel modifis tiun ukazon, sed por kiom da tempo? Ne surprize, *Kinnock* deklaris, ke la angla lingvo devus esti la oficiala lingvo de Eŭropo. Bedaŭrinde en Francio multaj snobuloj, tute ne regantaj la anglan lingvon, pensas montri sian modernecon uzante anglajn esprimojn (kun franca akĉento!) anstataŭ francajn esprimojn konatajn de ĉiuj, aŭ eĉ pseŭdoanglajn esprimojn, kiujn vera Anglo ne komprenus! La celo ŝajnas esti fanfaroni pri sia angla lingvo, kaj la stulta opinio, ke ili apartenas al iu "elito", dum ili nur fuŝas la klarecon de sia lingvo kaj agas kiel memvolaj vasaloj de "raso, kies destino estas regi la mondon"...(laŭ iu Usonano!).

Feliĉe, multaj Britaj kaj Usonaj esperantistoj, kiuj partoprenis la forumojn de *THE ATLANTIC* akre protestis kontraŭ tia sinteno, bedaŭrinde tiu forumo malaperis de la servoj. *THE GUARDIAN*, malgraŭ tio, kun aprobo de iu sen neniu sperto en la franca vivo, eĉ akuzis *Giscard d'Estaing* pro lingva ŝovinismo, dum li estis la unua prezidento de la franca respubliko, kiu prononcis sian unuan publikan deklaron tuj post sia elekto EN ANGLA LINGVO. Lastatempe, dum preparlaboroj por la konstitucioprojekto, li tute ne zorgis pri defendo de la naciaj lingvoj, ne menciante eksplicite la RAJTON DE ĈIU POPOLO UZI SIAN NACIAN LINGVON (tiel ke pluraj sugestis, ke li ricevu la mokpremion "premio de la angla karpeto"...).

Bedaŭrinde, *Giscard* ne estas la sola, kiu ne respektis la francan lingvon por montri sian "modernismon", same la ministro pri nacia edukado *Claude Allègre*, kiu deklaris, ke "...DE NUN LA ANGLA LINGVO NE PLU DEVAS ESTI KONSIDERATA KIEL FREMDA LINGVO EN FRANCIIO", kaj eĉ la tiutempa ĉefministro *JOSPIN*, kiu deklaris en Hong-Kong al la Ĉinaj studentoj, ke ili unue lernu la anglan (post malsukceso de Esperanto!!!), kaj nur poste la francan. En tiaj kondiĉoj komprenu, ke skribi pri "feroca rezisto de la franca lingvo" kaj sugesti, ke la franca lingvo celas instali hegemonion, estas tiel groteske, ke neniu objektiva observanto povas sincere kredi tion, sed la celo estas mensogi por kaŝi la tamen bone proklamitan intencon devigi la mondon uzi la usonanglan "por la ekonomia kaj politika profitoj de Usono" (laŭ "Praise for linguistic imperialism" de *David Rothkopf*).

Kaj *Richards* klare skribis "The Center should not tolerate resistance to the rule of English" (cf. *LINGUISTIC IMPERIALISM* de Pr *Robert Phillipson*). Eĉ la angla ministro pri internaj aferoj sugestis, ke fremdaj gepatroj en Britio ne uzu sian nacian lingvon hejme, sed ke ili parolu angle, por ke siaj infanoj aŭdu nur la anglan lingvon!

Ni vivas vere en stranga mondo, kie oni akuzas pri ŝovinismo tiujn, kiuj deziras konservi la rajton uzi sian propran lingvon, en kiu, kiel *Patten* kaj *Barnier*, ili kapablas plej bone sin esprimi!. Kaj se homoj sincere estas demokratoj, ili devas konscii, ke demokratio ne eblas, se iu ajn nacia lingvo estas la sola oficiala lingvo, ĉar tiam la nedenskaj parolantoj de tiu lingvo estos ĉiam duarangaj civitanoj. Konsenti je tio kiel faras nun tro da "etmensaj nekonsciaj aŭ profitemaj kunlaborantoj", estas konsenti je la planita vasaligo, kaj al detruo de la diverseco de kulturoj. Saĝaj homoj en Usono kaj en Britio, pli objektivaj ol siaj responsuloj, atentigis pri la danĝero de tia hegemonia politiko. La fama angla lingvisto *David Crystal* plurfoje skribis "May be one day it will be the only language left to learn. If that happens it will be THE GREATEST INTELLECTUAL DISASTER THAT THE PLANET HAS EVER KNOWN". Eble iam, la angla estos la sola lingvo kiu restos por lerni! Se tio okazos, estos LA PLEJ GRANDA INTELEKTA KATASTROFO, KIUN LA PLANEDO IAM KONIS. (en *LANGUAGE DEATH* de *David Crystal*). La usonaj lingvistoj de la *Lingva Societo de Ameriko* simile atentigis en 1994 pri la danĝero por la mondo kaŭzota de tia hegemonio: "The loss to humankind of genetic diversity in the linguistic world is (. . .) greater than even the loss of genetic diversity in the biological world"

(*la perdo por homaro de genetika diverseco en la lingva mondo estas pli grava ol eĉ la perdo de genetika diverseco en la biologia mondo*).

Tiuj saĝaj konkludoj bedaŭrinde estas malpli disvastigitaj ol la kutimaj anglaj juĝoj pri sia "supera" lingvo, kiuj mense manipulis tiom da homoj, kiuj konis nur sian lingvon: de 1582, kiam iu *Mulcaster* skribas "*I do not think that any language is better able to utter all arguments as our English tongue is*", do laŭ li neniu alia lingvo kapablas esprimi ĉiujn argumentojn pli bone ol la angla (tiam estis eble 5 milionoj da angloparolantoj), ĝis 1780, kiam *John Adams* profetis antaŭ iu Kongreso por Usona Akademio "*English is destined to be in the next and succeeding centuries (. . .) the language of the world*" (*la destino de la angla lingvo estas, ke ĝi fariĝu en la venonta kaj en la sekvontaj jarcentoj la lingvo de la mondo*. (en *English as a global language* de David Crystal, p. 64-68). *William White* en 1872 kaj *Pitman* uzas la samajn vortojn: "*La angla estas la lingvo de la estonteco*". David Crystal aldonas: "*These are two out of HUNDREDS OF QUOTATIONS IT IS POSSIBLE TO FIND IN THE LITERATURE OF THE TIME making this point. I HAVE NOT FOUND A SINGLE QUOTATION TO SUGGEST THAT A DIFFERENT VIEW WAS HELD BY ANYONE.* ". Kiam ĝisostaj ŝovinistoj kun neniu scio pri aliaj lingvoj konstante legas similajn frazojn, kompreneble ili estas influitaj. Ĉar David Crystal, aŭtoro de la *Kambrigo Enciklopedio* klarigas, ke tiuj du citaĵoj estas nur du el centoj da eldiraĵoj troveblaj en la literaturo de la tempo, kiuj pritraktas tiun temon. Li aldonas: "*MI NE TROVIS UNU SOLAN CITAĴON, KIU POVUS SUGESTI, KE IU AJN HAVIS MALSIMILAN VIDPUNKTON*".

Tiu certeco pri lingva supereco, pro nekono de aliaj lingvoj estis konstanta trajto, de *Macaulay*, kiu skribis en 1835, ke "*la angla lingvo entenas la intelektajn riĉaĵojn kreitajn de la plej saĝaj nacioj en 90 generacioj*", tiel ke "*la angla literaturo entenas pli ol ĉiuj aliaj literaturoj produktis kune dum tri jarcentoj*" (!!!) Por juĝi pri tio necesus koni la aliajn literaturojn ! *THE SUNDAY TIMES* en julio 1994 instigas Brition akcenti la disvastigon de la angla lingvo kaj de la britaj valoroj, kiuj kuŝas malantaŭ ĝi. ("*Britain must press ahead with the propagation of English and the British values which stand behind it*"). Kaj bonvolu noti la gazetan humuron, kiu aldonis: "*Only when the French recognize the dominance of Anglo-American English AS THE UNIVERSAL LANGUAGE in a shrinking world can they effectively defend their own distinctive culture*". (*nur kiam Francoj agnoskos la dominadon de la uson-angla lingvo kiel LA UNIVERSALA LINGVO en ŝrumpanta mondo, ili kapablos defendi sian apartan kulturon*).

Oni povas heziti pri la kvalito de tiu paradoksa "humuro", unue izole detruu la lingvojn, kaj poste pretendi, ke oni protektas ilin, tio ŝajnas la politiko de Kinnock kaj siaj vasaloj. Mi pli ŝatas la objektivajn juĝojn de la kompetentaj angloparolantaj veraj lingvistoj. Tiuj, kiuj volas juĝi per si mem kaj ne forgesis, ke "*neniam mortintaj fiŝoj naĝis kontraŭ la fluo*", povos interese legi "*English-Only Europe?*" de *Robert Phillipson*: ili interalie trovos p. 169 la komparon inter iu *Konferenco* en Hong-Kong en 1966 pri *Lingvaj Rajtoj*, en kiu **nur la denaskaj angloparolantoj povis libere sin esprimi**, kaj la samjara UK de UEA en Prago, dum kiu okazis *Simpozio pri Nitobe*, kiu donis al *Robert Phillipson* la okazon mire konstati, ke partoprenantoj de la tuta mondo povis libere komuniki en komuna internacia lingvo, inter ili Azianoj, kiuj memvideble ne suferis malavantaĝon. ("*It was amazing to experience participants from all over the world communicating confidently in a shared international language, among them a number of Asians who were manifestly at no disadvantage*". La konkludon de tio ni povas utile uzi por reagi al la kutimaj stultaj asertoj de ĵurnalistoj: "*As this event was my first experience of Esperanto in action (with interpretation provided for us non-esperantists) it was a vivid and memorable way of seeing at first hand that Esperanto is not merely utopian but a reality for those who have chosen to make it part of their lives, domestic, national and international The juxtaposition of the experience of English working badly and inequitably and Esperanto working well provides appetising food for thought*". Estus bone konigi tiujn paralelajn spertojn al tiuj, kiuj juĝas sen koni la realon; atestoj de angloparolantoj, kiam ili ne estas blindigitaj de mensa manipulado estas multe valoraj por ni, kaj tio donas novan okazon bedaŭri vortojn de tiuj, kiuj atribuas defendon de ĉiuj lingvoj al iu mita ĵaluzo aŭ eĉ hegemonia deziro. Estas tempo por kelkaj definitive ĉasi ĉiujn spurojn de ŝovinismo, lingva aŭ eksterlingva.

Delonge oni insistas pri la lingva problemo prezentita kiel *tempobombo*, sed neniu agis por solvi la problemon kun 11 lingvoj, kaj nun kiam temas pri 20 lingvoj, oni prezentas al ni la anglan solvon kiel la ekonomian solvon, sed la vero estas en la deklaroj, kiuj amasiĝis dum jarcentoj kaj estis reeldiritaj de nunaj anglosaksaj responsuloj, kiuj faras sian plej eblon por kulpigi la aliajn lingvojn, aparte la francan, kiu ŝajne aparte ĝenas ilin malgraŭ tiuj, kiuj helpas je la detruo de la klara franca lingvo. Al tiu ludo la angla lingvo, lingvo de granda kulturo sed ne sola, ankaŭ perdos sian aŭtentan kulturon, kaj *Pr Casey* de Kambrigo pravis dirante, ke kiam la angla fariĝos universala tio signifos la morton de la vera angla lingvo kaj "*estos funebra tago por Britio*" (en *The SPECTATOR*).

Kiam gravaj responsuloj kiel Kinnock, Barnier kaj Patten ne povas regi alian lingvon, kiun ili lernis, kiamaniere supozu, ke niaj lernantoj pro instruo de la angla jam en la elementaj klasoj, kapablos regi du fremdajn lingvojn, dum kelkfoje ili eĉ ne plu regas sian nacian lingvon invaditan de anglaj aŭ pseŭdoanglaj esprimoj? Por ke estu demokratio, la debatantoj devas esti lingve egalaj, **nur Esperanto ebligas tiun necesan antaŭkondiĉon**.



Bonan kuraĝon al sinceraj reagantoj.

A nos lecteurs: Au même titre qu'un livre en espéranto s'avère un atout de choix pour témoigner de la culture bien vivante de la langue internationale, l'édition de nouveaux Cd vient l'enrichir en permanence d'une façon différente mais tout aussi attractive !

**... chaque trimestre... un nouvel ouvrage (ou plusieurs !) dans ma bibliothèque...
et un nouveau (ou plusieurs !) Cd dans ma discothèque !**



Août 2004

Lettre d'information de VINILKOSMO n° 8
... Sur les musiques actuelles chantées en espéranto ...

Floreal nous écrit...

Bonjour Pol !...

*Nous vous avons déjà parlé de **Strika Tango** en "Edition Spéciale" lors de sa sortie en Juillet, mais comme nous n'avons pas fermé la cuisine malgré la chaleur de l'été, nous vous le proposons à nouveau .. en apéritif cette fois !!*

*En guise d'entrée, quelques fruits de mer avec le nouvel album de **Meven**, et comme plat de résistance, enfin cuit, le dernier **Esperanto Desperado** qui a échappé de justesse aux crocs du gros chien... :-|*

*Pour le dessert et le digestif, le temps d'une pause, entre septembre et octobre, du **Kaj Tiel Plu** au **Jak le Puil**, bientôt confit, et, tenez vous bien, un nouveau **Dolchamar**, à consommer sans modération ...*

En vous souhaitant "bon appétit" ...

Notre catalogue complet sur
<http://www.vinilkosmo.com>

==== Les Nouveautés Vinilkosmo ====

VKKD 70 " Civilizacio "

STRIKA TANGO

Depuis l'intervention pour le moins musclée en 1999 du leader de *Strika Tango*, Alejandro Cossavella, avec *La Porkoj* à l'époque (vkkd 23), on pouvait penser que son rock basic et puissant était le fruit d'un choix, forcément irréversible, de mener la langue de Zamenhof à travers barrages et portes blindées à coups de gourdin. Etait-ce faute d'une culture ou technique musicale suffisamment poussées, ou simplement par manque de patience pour agir avec plus de diplomatie ? Eh bien, tant pis pour les inconditionnels du genre comme pour les détracteurs allergiques, Alejandro est un artiste complet, multifacettes et hautement talentueux, qui n'a pas fini de nous étonner !

Ce nouvel album est une oeuvre profondément digne de **la vocation interculturelle de l'espéranto**, et son auteur, qui revendique avec force l'utilité d'un projet "au delà du langage", n'a pas hésité à laisser enregistrer les claviers, cuivres, et certaines percussions, par des musiciens d'horizons divers à des milliers de kilomètres de son cercle domestique. C'est dans le *Studio de La Trappe*, dans les locaux même de Vinilkosmo, que cette musique, pourtant fortement inspirée par la tradition latino-américaine, a trouvé toute la pluralité souhaitée par *Ale*, et échappe, du même coup, aux étiquettes qui tendent souvent à limiter le rayonnement de telles créations.

Pas moins de **treize musiciens de plusieurs pays différents** ont participé à l'enregistrement, et en guise de clin d'oeil final, *La Desertoj Dezertaj* (Les Desserts Déserts), un groupe informel, invisible et abstrait, comme *Ale* nous le décrit avec humour, conclut avec 3 pages bonus une oeuvre déjà dense et envoiante.

Cet album est **splendide, inspiré, gorgé du soleil** qui l'aura vu naître, et deviendra sûrement une référence phare, et si vous n'êtes pas sûr d'avoir compris pourquoi , eh bien achetez le, et puis c'est tout !

Pour en savoir plus, **écouter un extrait** ou commander en ligne :

<http://www.vinilkosmo.com//?disc=vkkd70&lng=f>

VKKD 71 " Plu Meven - Ondumoj tra la mond' "

MEVEN

C'est un premier CD, vkkd43, paru en 2001 et intitulé "*Meven*" qui donne aujourd'hui son nouveau nom à cet ensemble vocal, composé de bretons de tout âge et horizons, espérantophones confirmés ou en voie de le devenir, et qui se produisait jadis sous le nom de "*Chorale Espéranto-Bretagne*".

Souvent présents, depuis 1996, dans les divers congrès, stages et festivals du monde entier, comme celui du "*Chant de Marins de Paimpol*" en 2003, Meven exprime son goût du voyage et des échanges en nous invitant à voguer sur les mers du monde entier et danser aux rythmes d'instruments traditionnels tels le violon, la flûte ou l'accordéon qui viennent renforcer la sonorité résolument celte de l'ensemble.

Si, toutefois, c'est bien l'espéranto et le plaisir de le chanter qui réunit les membres de *Meven* sous la baguette de Franjo Provost, elle-même espérantophone, chef de chœur et professeur de musique, c'est le souhait de créer un pont entre une culture lyrique bien bretonne et l'essence universel de l'espéranto qui fait toute l'originalité et la force de leur démarche.

A consommer avec un bon verre d'hydromel !

Pour en savoir plus, **écouter un extrait** ou commander en ligne :

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd71&lng=f>

VKGD 72 " Hotel Desperado "

ESPERANTO DESPERADO

Après les mésaventures qui ont vu tout le matériel et les enregistrements d'*Esperanto Desperado* mis sous scellés dans le studio de "Christiana" à Copenhague, on peut dire que ce nouvel album revient de loin ! C'est sous le signe de la transhumance que la réalisation s'est finalement accomplie à travers quatre studios différents, dont notre studio *Vinilkosmo / La Trappe* pour un titre chanté par *JoMo*, déjà un vieux complice de ces desperados sans préjugés ni frontières.

Avec des sonorités empruntées au ska, reggae, rock, rythmes et mélodies des balkans, espagne, moyen-orient, afrique, etc... c'est une véritable '**musique du monde**' que produit ce groupe, déjà hybride par essence, puisque composé de membres originaires de Danemark, Bosnie, et Pologne, pays où le froid et les longues nuits n'ont d'égal que la chaleur et le tempérament festoyant de leurs artistes !

Nul doute que ce nouveau CD dépassera le succès déjà notoire du précédent (*Brokantajxoj - vkkd34*). Un disque à ne manquer sous aucun prétexte, et si par hasard *Esperanto Desperado* passe près de chez vous, allez le voir, ne le ratez surtout pas !

Le livret du CD est entièrement en couleurs et agrémenté d'excellentes photos par *Joey Cleary* que nous félicitons pour son regard des plus pertinents !

Pour en savoir plus, **écouter un extrait** ou commander en ligne :

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd72&lng=f>

KAJ TIEL PLU .. s'il vous plaît !

Après 3 semaines d'enregistrement et mixage intensifs au studio de *Vinilkosmo / La Trappe*, Le groupe barcelonais *Kaj Tiel Plu* (etc...) à bouclé son deuxième album qui s'intitulera "*Plaças al mi*" (*il me plaît*).

L'album, d'une durée de 45 minutes environ, présentera le style habituel du groupe: de la musique traditionnelle populaire médiévale (*des Troubadours*). Le résultat sera très plaisant et accessible à tout public.

Le mastering sera finalisé en septembre, et le Cd devrait sortir à l'occasion du *Congrès Catalan Transpyrénéen* qui aura lieu à *Céret*, près de Perpignan, en Catalogne du nord, durant la dernière fin de semaine d'octobre.

⇒⇒⇒⇒ *La libro-servo de "La Informilo" rappelle que des CD de Morice Benin et Jacques Yvart sont en stock.. et à votre disposition.. (voir bulletins précédents)*



Radioj en Esperanto



Informoj pri Radioj en Esperanto vi trovas ĉe:

http://www.tejo.org/uea/Radioj_En_Esperanto

Estas ankaŭ specifa diskutlisto pri la temo, por aliĝi, sendu sentekstan mesaĝon al:

per-esperanto-radioj-subscribe@yahogroups.com

Bonvole vizitu ĝin, kaj se vi havas sugestojn au aliajn informojn bonvole sendu al:

emilio@esperanto.org.br

Dankon,

Emilio Cid

Komisiito de la prezidanto de UEA pri Radioj en Esperanto
(mesaĝo sendita provizore de luko@esperantoland.org)

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2005 ĝis 2007

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2004, pagi vian abonon al **La Informilo** kaj vian membro-kotizon por nia asocio.

JAROJ:	2005	2006	2007
Abonoj por adresoj en Francio:	12 eŭroj	12 eŭroj	12 eŭroj
Abonoj por adresoj ekster Francio:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
Federacia kotizo:	6 eŭroj	6,30 eŭroj	6,50 eŭroj

Vi povas pagi la koncernan sumon:

1. **Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:**
 ESPERANTO FRANCE-EST poŝtĉekkonto 1997 72W NANCY
 Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo.
 La mencio de via **adres-kodo** faciligas la laboron de nia kasisto:
 ekzemple: abono Informilo + kotizo 2005 por **1025**
2. **Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY sendita al jena adres:**
 S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio
 Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, disko, donaco al ktp
 por 2005, 2006 ktp
 Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.
3. **Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz.** (menciu la celon de via pago)
4. **Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY**
 (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)
5. **Okaze de ĝiro**, vi povas samtempe komuniki rete vian adreson, adres-kodon kaj pago-celon al la kasisto uzante la jenan ret-adreson: **la.informilo@free.fr**

Ekonomio : Profesia entrepreno pri internacia komerco lanĉas servojn en Esperanto



Informoj el <http://gxangalo.com/noticoj/1697.html>
 Por pliaj informoj vidu : <http://eo.feliso.com/>

⇒ NB el la redaktejo de "La Informilo" : **Gxangalo** estas impona inform-portalo tre vizitata de esperanto-interretanoj

Sendita de **Redakcio** je 2004/9/12

Feliso estas entrepreno, kiu asistas aliajn firmaojn, precipe etajn kaj mezgrandajn, eniri en internacian komercon. Nun, **dank' al Esperanto**, ĝi pretas proponi tiujn servojn al individuoj kaj firmaoj tra la tuta mondo. La brazila entrepreno lanĉis siajn servojn en Esperanto, kune kun propono pagi esperantistojn por kunlaboro.

Laŭ informoj el la retejo de *Feliso* <http://eo.feliso.com> : "Estas nerifuteble, ke vendoj al alilandaj merkatoj iĝas ĉiutage pli kaj pli grava, kaj iĝas la plej trafa kaj sekura maniero prosperi en la negocoj. Sed komerci internacie ankoraŭ ŝajnas al multaj etaj kaj mezgrandaj firmaoj kaj entreprenistoj io apenaŭ atingebla. Se ne mencii barilojn doganajn, amason da dokumentoj kaj formularioj, ĉefe malhelpas lingvaj baroj. Tiel *Feliso* decidis enkonduki en siajn negocojn la opcion negoci en la internacia lingvo Esperanto. Ĉi tiu decido inkluzivas ne nur la funkciadon de niaj transakcioj kaj operacioj en Esperanto, sed ankaŭ la eblecon uzi lokajn klubojn, asociojn kaj ĉe unuopulojn esperantistajn kiel reprezentantojn de *Feliso* en kelkaj landoj".

La lanĉo de servoj en Esperanto fare de profesia eksport-importa entrepreno reprezentas unikan ŝancon por finfine antaŭenirigi komercajn rilatojn en la Internacia Lingvo. La Administracio de *Gxangalo* jam partneriĝis al ĉi tiu nova iniciato, pere de la permeso enpaĝigi en la retejon de *Feliso* la lastajn noticojn pri ekonomio, publikigitajn en ĉi tiu portalo.

... el *Gxangalo*-redakcio



El nia libroservo

Informoj



⇒ La libroservo partoprenos la **Bavelo seminarion en Burg teck apud Stuttgart la 8a/10an de oktobro 2004**. Se vi volas certe trovi deziratan libron tie, mendu gxin antaŭe al la adreso poŝta aŭ reta de la libroservo (libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR 54500 VANDŒUVRE libroservo.efe@wanadoo.fr)

⇒ Se vi deziras aĉeti librojn proponatajn en tiu folio, la sendkostoj estos fakturitaj maksimume laŭ la kostoj de la poŝta afranko. Tamen, tiu sendkosto ne superos 3,58 eurojn, sendepende de la nombro de libroj menditaj (tio validas nur por adreso en Francio).

⇒ La ibroservo esperas baldaŭ aperigi sian katalogon en la Informilo



Nove alvenintaj libroj

Arboj en Aŭstralio kaj suda Eŭropo, 6-lingva terminaro, 22 p, **Lilli Giloteaux**, 5,00 €. Nomo de diversaj arboj en 6 lingvoj kun desegnoj de ili, iliaj folioj kaj iliaj fruktoj.

Vortludoj, 38 p, **Lode Van de Velde** *Flandra esperanto Ligo*, 3,90 €. Priskribo de 20 diversaj vortludoj, kiaj anagramoj, kalemburoj, kriptogramoj....

Dek tagoj de kapitano Postnikov, historia romano, 336 p, **Mikaelo Bronŝtejn** *Rusa eldonejo*, 22,50 €. Dek tagoj de pioniroj de la esperanta movado, interalie de L. Zamenhof.

Por mendi librojn:



1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDŒUVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)
- per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»
- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 euroj por adreso en Francio))

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo

MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

- S-ro/ino
-
-
-
-

En

la

Subskribo:

Niaj legantoj verkas

CHATEAUBRIAND

CHATEAUBRIAND, homo, el kies vivokuro estus ebla turni kelke da hororfilmoj, en kiuj kuniĝas religia entuziasmo kun pornografio kaj perverseco. La grafo François René Chateaubriand (1768-1848) estis fame konata verkisto kaj aŭtoro de konataj "Legendoj postmortaj". La libron li verkis 30 jarojn, per kio li konstruadis sian monumenton de gloro. Pro siaj ŝuldoj li estis devigata tiun-ĉi taglibron vendi kun kondiĉo, ke ĝi estos publikita ĝis kiam li mortos. Sed la verkaĵo aperis en 1948.

Chateaubriand naskiĝis en 1768 kiel la deka infano en malnova, sed malriĉa nobela familio en bretona urbeto Saint-Malo, proksime de insuleto Mont Saint-Michel, nome de la monto Sankta Mikaelo, kiun la pilgrimantoj konsideras same grava kiel Romon aŭ Jeruzalemon. Eble estis tio ĝuste la energio de la loko, kiu kaŭzis, ke la grafo Chateaubriand devis paciĝi kun la kristaneco de Francio, ribeliĝinta kontraŭ la religio post la granda revolucio. En ĉirkaŭaĵo de Mont Saint-Michel estas tempesta al- kaj defluo kaj kiu ne sukcesas dum 2 horoj de la defluo foriri, tiu estos entombigita per subita alfluo. En la ĉirkaŭaĵo rondkuras sufiĉe da legendoj pri tiuj, kiuj ne sukcesis.

La insulo en pagana tempo servis kiel enterigejo. Eble tio estis la kolero de la mortintoj, kiu kaŭzis, ke tiu-ĉi terpeco forŝiriĝis de la marbordo kaj fariĝis insuleto, al kiu en la 8a jarcento al loka episkopo revelaciis Sankta Mikaelo kaj petis lin, ke li tie konstruu sanktejon. La sanktejo estis samtempe eĉ fortikaĵo. La nebuloj, ventoj, murmurado de grandaj ondoj, en aero cirkulantaj spiritoj de mortintoj venĝemaj paganoj kaj senkompataj kristanoj, tio estis atmosfero, en kiu Chateaubriand kreskis. Malgraŭ sia nobelara deveno, la familio ne kapablis certigi al infanoj sufiĉe da prizorgo kaj edukiĝo. La malgrandan François-René unue edukadis malriĉa juda strato. Kiam la patro akiris certan havaĵon, aĉetis malnovan kastelon en KOMBURG, kie naskiĝis kaj mortis multe da liaj antaŭuloj. Tra dekoj da malhelaj ejoj muĝis la vento, en malserenaj truoj estis multe da strangaj objektoj. Ĉiun, kiu enpaŝis la kastelon, atakis stranga tristeco kaj silento.



Malserena kastelo

En "la legendoj postmortaj" Chateaubriand priskribas malserenajn aŭtunojn kaj vintrajn vesperojn, kiam la familio sidadis apud fajrujo, en kiu flagris eta fajro. La patro silente trairedis la salonon kaj eksidinte – lia frunto estis malserena. En la koridoroj aperadis iama posedinto de la kastelo, iam oni aŭdis liajn paŝojn. La infanoj timis. La patro videble ekvidis eĉ tro fortan amikecon inter la plej juna filino Lucilla kaj François-René, kiun li disbatis per tio, ke la filon li sendis al la avino malproksimen de la hejmo. En ĉiu kazo Chateaubriand estis la unua verkisto, kiu la pikantan rilaton al sia fratino prezentis al la legantaro. Kiam la filo post certa tempo revenis, sian fratinnon preskaŭ ne rekonis. Lucilla grave malsaniĝis, maldikiĝis....

ŝia psika malsano devigis la familion doni ŝin en monahinejon, kiu en la 19a jarcento pli multe similis al turmentejo. La histerion oni kuracis per malvarma akvo. La knabino ne eltenis kaj sin mortigis. Ŝi postlasis iom da poemoj, en kiuj ŝi prikantis sian fraton. La patro por sia filo planis militkarieron, sed tiu preferis vojaĝadon kaj en 1791 forveturis kun ia ekspedicio en amerikan sovaĝlandon.

Ekaŭdinte pri mortigo de reĝo Ludoviko, li revenis Francion kaj eniris la armeon de princoj, la opoziciuloj de la revolucio. Liaj patrino kaj fratinoj estis malliberigitaj, kelkaj liaj parencoj ekzekutitaj. Post renovigo de la monarkio (Napoleono), li enpaŝis liajn servojn kaj fariĝis delegito en Romo. La regnestro lin estimis, la aliaj lin malamamis kaj estis ankaŭ tiuj, kiuj lin ŝatis. Neniun el la virinoj li admiris, sed ili adoris lin. Chateaubriand kunigadis religian entuziasmon kun seksa libero. Kiel junulo li travivis "revenon" kaj ekde tiu tempo lin interesis Dio kaj naturo. Verkante la libron "Spirito de kristaneco" li havis sur la genuoj sinjorinon de BEAMONT. Ne ĝenis lin pieco, kie temis pri seksa diboĉo.

Li mortis en sia 80-jariĝo kaj antaŭ la morto petis, ke li estu enterigita en proksimeco de Saint Malo, sur pinto de roko elstaranta malproksimen en la oceanon. Li volis nur aŭdi la mar-murmureton. Eble li kredis, ke surdigos eĉ la ĉeston de senkrura grafo en la kastelo KOMBURG, kies ombro lin akompanis ĝis la fino de lia vivo.

El "Spirit" trad.

Jaci

ni provu...



... rideti!

Iu viro viktimitiĝis je domŝtelo. Iom poste telefonvoko el la policejo informas, ke oni ĵus kaptis la ŝteliston. Tiam pridemandas la plendinton:

- „Ĉu mi povas alparoli la ulon?
- Hum, kion vi deziras peti de li?
- Aŭskultu, sinjoro Inspektoro... Li eniris mian domon nokte, je la dua... sen vekoj mian edzinon! Se li klarigas al mi kiamaniere li sukcesis tion fari, vi nuligu mian plendon!...”

☆

Iu blondulino decidas iutage trejnadi rajdarton. Tiun ĉi matenon ŝi do surgrimpas la beston tute sen ia helpo. Tuj poste la ĉevalo komencas galopi pli kaj pli rapide kaj la povrulino iom post iom glitas el la selo. Ŝi tremadas, provas kapti vane la krinieron... La besto daŭre galopas sen konscii, ke ĝi surportas rajdantinon!

Terurigitte, ŝi lasas sin terenfali ne evitante, ke unu piedo restas blokita en la metala piedingo! Ŝia kapo ekfrapas la grundon...

Ŝi estas preskaŭ ŝveninta, kiam la Direktoro de la ĉio-vendejo alkuras kaj forigas la elektro-konektingon...

☆

Dato de la tago, 30an de decembro... La juĝisto:

- „Kion oni fakte riproĉas al vi?
- ... ke mi kulpas, ĉar mi havigis al mi tro frue la kutimajn donacojn por la jarfina festo...
- Ĉu vere? Kiam vi faris tion?
- La 24an de decembro...
- Sed tiam, ne tro fruis!
- Ne, sed la enirpordo de la magazeno estis ankoraŭ ŝlosita!...”

☆

Ŝancelanta virino eniras aŭtobuson kaj alparolas haste sidantan pasaĝeron

„Ĉu vi konsentus disponigi al mi vian sidlokon mi petas, mi ja estas graveda...”

- Memkompreneble Sinjorino, bonvolu!...”

Li stariĝas kaj kelksekunde poste scivolpetas;

„Sed tion oni vere ne suspektas... De kiom da tempo vi jam spertas tiun situacion?”

- De dek minutoj... sed tio preskaŭ ŝvenigis min!...”

☆

NB el la redaktoro de „La Informilo”:

Ĉi tie mi volis rakonti al vi etan anekdoton pri bumerango... sed mi forgesis ĝin!... Sed paciencu... ĝi nepre revenos... kaj kuŝos en la n° 128!

☆


Kliento vizitas artan ekspozicion pri pentraĵoj.

„Mi deziras ion por mia manĝoĉambro, je elstara gusto, ne tro multekosta kaj prefere per oleo ellaborita”.

La deĵoranto prezentas sinsekvaj diversajn pentraĵojn sed sensukcese.... Finfine li eniras apudan ĉambron kaj revenas kun belaspekta pakajeto enmane.


„Nu, tion vi certe aprezos. Temas pri aro da dekdu skatoloj je plej bongustaj sardinoj...”

☆



En ĉiuj urbaj busoj atentigas la pasaĝerojn specifa ŝildeto pri ilia sinteno rilate al la stiranto. Sed tiuj „admonoj” diversas laŭ la landoj

- en Germanio: strikte malpermesata alparoli la ŝoforon
- en Italio: ne tro alparolu la ŝoforon, li bezonas ambaŭ manojn por stiri.
- en Francio: malpermesate konversacii kun la ŝoforo... kaj en Marsejlo (sudfranca haveno): malpermesate respondi al la ŝoforo!...



Virino eniras apotekejon kaj petas arsenikon. La fakisto, iom surprizita, pridemandas:

„Kion vi celas per tiu tre danĝera toksaĵo?”

- Mian edzon mi volas mortigi...
- Hum, espereble vi ŝercas, estimata Sinjorino... Neniam kaj neniel mi helpus por murdi iun!...”

Tiam, la virino malfermas sian mansaketon kaj eltiras foton, sur kiu vidiĝas ŝia edzo dormanta apud la edzino de la apotekisto...

„Nu, jes... Evidente, ĉar vi havas recepton, mi ne povas rifuzi!...”

☆

Daŭre soifanta ecbriulo eniras kafejon. Ĉar la deĵoranto foras iom longtempe, la ulo iras al la breto sur kiu staras racie sed inverse ordigitaj glasoj, cele memservon...

Li kaptas unu, okulumas al ĝi perplekse, remetas ĝin je la taŭga loko, prenas la sekvantan, tutsame ekzamenas kaj remetas apud la unuan...

„Strangas tiuj glasoj... Oni ne povas versi ion enen, „ili” ŝtopis la supraĵon!...”

Post iom da pripensado, li suprenlevas la unuan... pli atente rigardas... kaj konstatas, ke... ne estas fundo!

„Nu, mi komprenas la kialon!... La tuta unua vico estas nur ornamaĵo... Ne eblas uzi ilin por trinki!...”

☆

„Paĉjo, kiu rampanta besteto estas violkolora, posedas ok flavajn vilajn piedojn, du longajn ruĝajn antenojn kaj kurban nigran pikilon meze de la buŝego?”

- Nu, bedaŭrinde, Johaneto, mi malfacile solvas enigmojn... Pri kio temas?
- Mi ne scias, sed tiu besteto alproksimiĝas malantaŭe, je via kolo...”

☆

Iu viro invitas amikon cele viziton de sia nova apartamento. En la banĉambro la vizitanto scivolpas:


„Por kio utilas tiu dika tubo el metalo ĉe la muro?”

- Temas pri parolanta horloĝo... Aŭskultu!...”


Tiam li kaptas alkroĉitan etan balailon, frapas trifojesur la tubon kaj tri sekundojn poste aŭdiĝas riproĉa voĉo:

„Ĉu vere indas tiom bruegi nokte je la unua kaj kvarono?”

☆




DISTRANGULO



... pri urbo-plano ...

Kompletigu la planon de la urbo-kvartalo kun nomoj de de la stratoj kaj de la placoj. La ĉisubaj indicoj helpos vin.

- 1 - Strato *Baghy* tuŝas nek straton *Schwartz*, nek straton *Dresen*. Strato *Auld* atingas la trafik-cirklon, kiu ne alirigas al la placo *Grabowski*.
- 2 - Strato *C. Rossetti* atingas placon. La sakstrato estas la strato *Lanti*.
- 3 - Strato *Dresen* trairas la tutan kvartalon. Strato *Beaucaire* atingas straton *Lapenna*.
- 4 - Rondirante la trafik-cirklon, vi malkovros sinsekve straton *Berthelot* kaj straton *Cseh*.
- 5 - Stratoj *Delaire* kaj *Mahé* kruciĝas perpendikle, kaj stratoj *Schwartz* kaj *Ragnarsson* paralelas.
- 6 - Strato *Sekejl* tuŝas 3 aliajn stratojn. Strato *Piron* trafas straton *Delaire* sedŝ ne straton *Auld*.



- | | | | | | | | |
|---|-------|---|-------|----|-------|-------|-------|
| 1 | _____ | 5 | _____ | 9 | _____ | 13 | _____ |
| 2 | _____ | 6 | _____ | 10 | _____ | 14 | _____ |
| 3 | _____ | 7 | _____ | 11 | _____ | Pl. 1 | _____ |
| 4 | _____ | 8 | _____ | 12 | _____ | Pl. 2 | _____ |

Silab-enigmo

Helpe de la ĉi-subaj vort-eroj alfabete ordigitaj, malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, donas aserton de la fama franca humoristo *Sacha Guitry* (*Saŝa Gitri*).

aco alo an ar ar aso ce ek er eù fe fu gio gre in in iz iz izo jno ju ki kio li li ku la la lar le
lo lo lo lu ma mo mo ne nie od og ogo oj ol oli op op pa po po ras ro se so ta tar ti ti to
tra zo

- | | | |
|----|---------------|-----------------------------|
| 1 | + - - + - - - | kvazaù dormanta stato |
| 2 | + - - + - - | nun 25 landoj |
| 3 | + - - + - - | olimpiklando |
| 4 | + - - + - - | speco de te-preparo |
| 5 | + - - + - | apartigis el la aliaj |
| 6 | + - - + | filo de filo |
| 7 | + - - + - - | transportrimedo |
| 8 | + - - + - - - | mambesto |
| 9 | + - - + - | arigi falĉitajn herbojn |
| 10 | + - - + | kunigi metal-pecojn |
| 11 | + - - + | ia sperta ag-mamiero |
| 12 | + - - + - | ĉagren-signo |
| 13 | + - - + - - | religio |
| 14 | + - - + - | dekoraci-procedo |
| 15 | + - - + - - - | ordo de krustacoj |
| 16 | + - - + - | juvel-mineralo |
| 17 | + - - + | haùt-malagrabligi |
| 18 | + - - + - - - | li interesiĝas al sia medio |
| 19 | + - - + - - | sekso |
| 20 | + - - + - - - | havanta 2 egalajn laterojn |
| 21 | + - - + - - | parto de teatro |
| 22 | + - - + - - - | ofende fiera |
| 23 | + - - + - - | florparto |
| 24 | + - - + - | geologia ter-tavolo |

Mistera krado

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14
1	A	A	G	L	D	A	C	I	I	A	E	I	B	E
2	Ĉ	I	I	N	F	A	I	I	L	A	I	I	I	N
3	J	J	N	T	I	N	L	R	L	F	L	R	N	O
4	O	J	O		I	P	M		M	I	S	R	R	O
5	P	L	S		O	U	P		O	V	V	U	R	U
6	Z						R						T	U

Transigu suben, en la duan kradon, la literojn de la unua (alfabete kaj vertikale ordigitaj por faciligi al vi la malkovron de la solvo).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14
1				■								■		
2					■					■				
3		■			■			■						
4			■							■				
5				■				■						
6					■									



Solvoj de la lastaj enigmoj - n° 126

- 1 - « Stvbrnz » : *Diferenco inter civila vestaĵo kaj uniformo: se vi surhavas la unuan kaj mortigas unu homon, vi estas murdisto... Se vi surhavas la duan kaj mortigas dek homojn vi estas heroo.*
- 2 - „Silab-enigmo”: *„Legi inter la linioj efikas. La okulojn malpli lacigas.”*